

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

**SOIRÉE
RÉCITS DE VOYAGE**
mercredi 4 mai 2011

20h - Salle du Petit Mathurin
44, avenue Jean XXIII à Angers
Jonathan Baradeau relatera son parcours avec un ami
sur le continent africain et plus particulièrement
en Tanzanie

La date à retenir :

Quelques mots

Vous trouverez dans ce bulletin, un bref compte-rendu de notre Assemblée Générale. Nous entamons donc une nouvelle année pleine d'espoir après les départs de trois de nos anciens adhérents.

Ne manquez pas de nous soutenir dans nos différentes actions et de venir nous voir aux différents stands où quelques-uns d'entre nous représenteront l'espéranto.

Pierre Jagueneau, Président

Le livre du mois

MAIGRET - ROMAN : LE CHIEN JAUNE

Le belge Georges SIMENON (1903-1989) est un des auteurs de romans policiers parmi les plus lus et les plus couronnés de succès du 20^{ème} siècle. Déjà, avant ce livre-ci sont parus des traductions de trois «Maigret» en espéranto : « Maigret hésite » (original : 1968), «Maigret et la vieille dame» (original : 1949) et «L'ami d'enfance de Maigret» (original : 1968) ; tous trois sont donc issus de la période avancée de la série des «Maigret».

Dans «Le Chien Jaune», l'inspecteur Maigret arrive au village Concarneau qu'il n'avait jamais visité auparavant. Avec lui se trouve l'inspecteur Leroy, son nouveau collaborateur. Peu après leur arrivée, un villageois très connu, Monsieur Mostaquet, le principal négociant en vins du village, est tué par balle. Mystérieusement, apparaît aussi un chien jaune que personne dans le village ne reconnaît. Ce chien joue un rôle dans tout le roman et, de plusieurs façons, il est une clé pour l'action criminelle que doivent résoudre Maigret et Leroy.

D'autres victimes suivent, et il apparaît que vraisemblablement elles sont, d'une certaine manière, liées les unes aux autres, bien que la façon de faire ne soit pas claire.

Maigret observe avec patience. Il exhorte constamment son assistant : «Ne déduisez pas, ne supposez pas, n'ayez pas de théorie, ne concluez pas. Observez seulement, toujours et de toutes les façons. Finalement, la solution des énigmes apparaîtra. Soyez prêt à la relever». Maigret, par ailleurs, n'a pas trop tendance à discuter des crimes avec d'autres personnes. Il collecte de solides faits et informations, à l'opposé de Sherlock Holmes et Hercule Poirot. Il n'utilise pas de connaissances propres, de disciplines spéciales. Ensemble avec lui, nous les lecteurs, nous observons les événements et avec Maigret nous guetons les actions des villageois, spécifiquement des villageois qui, d'une certaine manière, sont en rapport avec l'enquête, avec les victimes ou au sujet des on-dits.

Plusieurs fois dans le roman, Simenon semble nous mener dans toutes les directions ou nous faire croire qu'il nous mène sur la mauvaise piste. Mais ne croyez pas forcément tout ce qui se fait entendre ou tout ce qui paraît quasiment évident.

La description soignée, donnée dans cette œuvre par Simenon, attire beaucoup. Le caractère de Maigret nous oblige, peu à peu, à nous creuser la tête.

Daniel Luez a traduit l'œuvre en espéranto ; il a été en son temps rédacteur en chef de «Fonto», dont le style en espéranto est plaisant et habile. Il est aussi le traducteur des trois autres romans de Maigret édités en espéranto.

Source : Article de Donald Broadribb de Monato (www.monato.net)

Kelkaj vortoj

Vi trovos en tiu bulteno koncizan protokolon pri nia Ĝenerala Kunveno. Ni komencas novan jaron esperplenan post la forpaso de tri malnovaj grupanoj.

Ne forgesu subteni nin en niaj diversaj agadoj kaj viziti nin ĉe la budoj, kie kelkaj el ni reprezentos Esperanton.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

La monata libro

MAIGRET-ROMANO : LA FLAVA HUNDO

La belga verkisto Georges Simenon (1903-1989) estas unu el la plej sukcesaj, kaj vaste legataj, krimromanistoj de la dudeka jarcento. Jam antaŭ ĉi tiu libro aperis tradukoj de tri Maigret-romanoj en Esperanto: "Maigret hezitas" (originalo: 1968), "Maigret kaj la maljuna damo" (originalo: 1949), kaj "Amiko el la infanaĝo de Maigret" (originalo: 1968), do ĉiuj tri el la malfrua periodo de la Maigret-serio.



En "La flava hundo" inspektoro Maigret alvenas al la vilaĝo Concarneau, kiun antaŭe li neniam vizitis. Kun li estas inspektoro Leroy, nova kunlaboranto lia. Nelonge post ilia alveno pafita estas bone konata vilaĝano, s-ro Mosta-

quet, la ĉefa vinnegocisto de la vilaĝo. Mistere aperas ankaŭ flava hundo, kiun neniu en la vilaĝo rekonas. Tiu hundo rolas tra la tuta romano, kaj kelkrilate estas ŝlosilo por la krimagado, kiun devas solvi Maigret kaj Leroy.

Aliaj viktimoj sekvas, kaj iĝas verŝajne, ke ili estas iel kunligitaj, kvankam la kialo ne estas evidenta. Maigret pacience observas. Li konstante admonas sian kunhelpanton: ne dedukti; ne hipotezu; ne teoriumu; ne konkludu. Nur observu, ĉiam kaj ĉiel. Fine la solvo de la krimoj montros sin. Estu preta ĝin rimarki. Maigret ankaŭ ne emas diskuti la krimojn kun aliaj personoj. Li kolektas solidajn faktojn kaj informojn. Malsimile al Sherlock Holmes kaj Hercule Poirot, li ne utiligas specialajn fakajn sciojn proprajn. Kune kun li, ni, la legantoj, observas la eventojn, kaj kun Maigret ni gvatatas la agojn de la vilaĝanoj, specife de la vilaĝanoj, kiuj iumaniere rilatas al la enketado, al la viktimoj, aŭ pri kiuj estas onidiroj.

Plurfoje en la romano Simenon ŝajnas miskonduki nin aŭ kredi al ni, ke li miskondukas nin. Sed nepre ne kredu ĉion, kio aŭdiĝas aŭ kvazaŭ evidentas.

La zorga priskribado, donita de Simenon ĉie en la verko, tre allogas. Kaj la karaktero de Maigret iom post iom cerbumigas nin.

Tradukis la verkon Daniel Luez, iama ĉefredaktoro de Fonto, kies esperanta stilo estas plaĉa kaj lerta. Li estas la tradukinto ankaŭ de la tri aliaj Maigret-romanoj eldonitaj en Esperanto.

Artikolo de Donald Broadribb el Monato (www.monato.net).

STAGES INTENSIFS D'ESPÉRANTO AU PRINTEMPS 2011 À GRÉSILLON

Memorindaj datoj

23 - 30. JULIO 2011

96-a Universala Kongreso de Esperanto, UK en Kopenhago, Danio
Tel. +31 (0)10 436 1044

30. JULIO - 6. AŬGUSTO 2011

4-a INA-Konferenco (naturkuracado), Herzberg am Harz, Germanio

30. JULIO - 6. AŬGUSTO 2011

84-a SAT-Kongreso en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino

8 - 15. AŬGUSTO 2011

FESTO en Grezijono-Kastelo, Francio

Apprenez l'espéranto en stage intensif :

2 niveaux de départ, A2 et B1

Passez un examen international d'espéranto :

3 niveaux, B1, B2 et C1

COURS 1 (A2 =>B1)

«Elanu... saltu !» (1-6 mai 2011)

Professeur : Christophe Chazarein, Français de Toulouse

COURS 2 (B1=>B2)

«Verve pri verboj» (1-6 mai 2011)

Professeur : Stefan MacGill, Néo-Zélandais résidant à Budapest, Hongrie



Examen international CECRL

Niveaux B1, B2 et C1 (7-8 mai 2011)

Date limite d'inscription pour l'examen : le 15 avril 2011

Pour plus de renseignements :

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20>

Malbona novaĵo

Les émissions en Espéranto de Pola Radio ont cessé !

La plus que cinquantenaire histoire de l'émission en Espéranto de Pola Radio vient de s'achever. La dernière émission a été publiée sur Internet le 31 janvier 2011, et aucune autre émission ne sera programmée. Le directeur de Pola Radio a décidé que l'unique employée de la rédaction Espéranto, Gabriela Kosiarska, sera affectée à d'autres tâches à partir de maintenant.

Mercredi 2 février rien n'est apparu sur le site internet de Pola Radio. Auparavant, Gabriela Kosiarska a fait paraître sur Facebook, dans le groupe des amis de Pola Radio, l'information suivante :

"...Chers Auditeurs, Chers Amis de la Radio, aujourd'hui nous avons pour vous une triste information qui concerne l'arrêt de notre programme en Espéranto. Suite à la décision du directeur de Pola Radio, à partir d'aujourd'hui, il ne me sera plus possible de continuer mes émissions en Espéranto. Nous fournirons bientôt à nos auditeurs et amis de plus amples informations ..."

Finigis la Esperanto-elsendoj de Pola Radio !

La pli ol 50-jara historio de la Esperanto-redakcio de Pola Radio estas finita.

La lasta elsendo estis publikigita en la reto la 31-an de januaro 2011, kaj pliaj elsendoj ne okazos. La estraro de Pola Radio decidis, ke la sola dungito de la Esperanto-redakcio, Gabriela Kosiarska, ekde nun havu aliajn taskojn.

En merkredo, la 2-a de februaro,

nenio aperis en la retejo de Pola Radio. Anstataŭe en la Facebook-grupo de la amikoj de Pola Radio aperis la jena informo de Gabriela Kosiarska:

"...Karaj Geaŭskultantoj, Karaj Radioamikoj, hodiaŭ ni havas por vi malĝojigan informon pri foresto de nia E-programo. Nome laŭ la decido de la estraro de Pola Radio ekde hodiaŭ mi ne plu povas okupiĝi pri ili. Ni klopodos baldaŭ liveri al niaj aŭskultantoj kaj amikoj pliajn informojn..."

L'article complet au sujet de la clôture est lisible dans "Libera Folio", <http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio>

La tuta artikolo pri la ĉesigo estas legebla en Libera Folio,

<http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio>

Nathalie Dubrulle au Brésil

(suite de la 1ère partie parue dans Anĝeva Folio n°18)

EXTRAITS DE SON RÉCIT DE VOYAGE

d'après sa conférence-diaporama à Maillet (Indre) le 22/10/2010

Rio de Janeiro

Nathalie passe 4 jours chez Telma, une espérantophone logeant dans un quartier tranquille (le plus sûr de Rio). La montée au «Pain de Sucre» par le téléphérique (alt. 396 m) nous procure une vue superbe sur la plage rouge. C'est le plus beau point de vue qu'elle aura sur la ville.

Iha Grande (au large de Rio)

C'est une île sans aucune voiture, longtemps repère de pirates et qui a aussi hébergé une léproserie puis une prison. Elle est protégée par l'état et fait maintenant "le repère des touristes" avec plus de cent plages produisant de très belles vagues pour faire du surf..

Dans cette île, Nathalie y fera de grandes marches en forêt amazonienne avec ses 3 enfants.

Belo Horizonte

2ème rencontre d'un espérantophone sur son lieu de travail. Il s'occupe de jeunes en difficulté : ce sont des ados déscolarisés et re-scolarisés selon le programme du Président Lula, président très populaire en France mais quelque peu controversé au Brésil.

Mariana

C'est dans cette petite ville que Nathalie arrive pour la semaine Sainte qui est très fêtée dans cet État : 3000 personnes y sont présentes. Puis c'est la visite d'une mine d'or fermée en 1985 ; visite traduite par un brésilien en espéranto.

Ouro Preto

Il y a 24 églises dans cette ville de 200 000 habitants qui dénombre autant de quartiers que d'églises. Les rues sont pavées et très en pente. Rencontre d'Amarillo, un autre espérantophone.

Brasilia

C'est la seule ville récente : elle a été créée en 1956 «en 1000 jours» dit-on. Pour chaque monument, l'architecture a été pensée. Deux exemples : la cathédrale avec ses 16 colonnes incurvées vers l'extérieur, symbole des hommes en prière regardant le ciel ou bien encore le parlement en forme de «H», symbole de l'humanité. Brasilia est classée au patrimoine mondial de l'UNESCO. <http://fr.wikipedia.org/wiki/Brasilia>

Hébergée chez Josiane, Nathalie pourra fêter le cinquantenaire de l'inauguration de la ville avec beaucoup de spectacles de musique dans les rues.

Suite et fin de l'article dans votre prochain numéro




Bicikli kaj Esperantistiĝi

L'AlterTour de France avec une participation internationale espérantiste ?

Herman Deceuninck, Belgique, attire l'attention sur la possibilité, pour les cyclistes espérantophones, de participer à l'Altertour de France 2011, c'est-à-dire au Tour de France alternatif.

Tous renseignements sur le site :

<http://altercampagne.free.fr/pages/2008/AlterTour/base.html>



En outre, sur le site www.bikechina.org, l'espérantophone chinois Hans Ngo, de Chengdu, membre de Sichuan Esperanto-Asocio, a exprimé son intention de participer avec son amie étasunienne Bobbi Fisher, à la course de longue distance Paris-Brest-Paris 2011 pour 'ultrabikers', c'est-à-dire 1200 km aller-retour. Si Hans Ngo parvient à se préparer, il sera le premier cycliste chinois - et espérantiste ! - à participer à cet événement sportif.

Laŭ mesaĝo de Renata Ventura (Brazilo) :

Koreaj vojaĝantoj

Sud-korea paro vojaĝas tra la mondo parolante Esperanton.

Jam de 8-monata vojaĝo, Ko KYUG JA kaj An JONG SOO trairis pli ol 20 landojn, kie ili povis interŝanĝi informojn pri daŭraj energioj.

Vidu kaj aŭskultu ilian intervjuon en Brazilo :

<http://www.youtube.com/watch?v=kEQAdcfTK18&feature=related>

Voyageurs coréens

Un couple sud-coréen voyage à travers le monde en parlant l'espéranto. Depuis déjà 8 mois de voyage, Ko KYUG JA et An JONG SOO sont passés dans plus de 20 pays, où ils ont pu échanger des informations sur les énergies durables.

Voyez et écoutez leur interview au Brésil :

<http://www.youtube.com/watch?v=kEQAdcfTK18&feature=related>

Korprema atesto

SAUVÉ PAR L'ESPÉRANTO

Le 21 mai 1940, dans la ville d'Aubigny-en-Artois, les soldats de l'armée d'invasion arrêtent de nombreux civils. Moi-même je suis un de ceux-là. Nous devons nous tenir bras en l'air. Auprès de moi, un Belge. C'est un espérantiste et je commençais à l'apprendre un peu. Donc, nous échangeons quelques mots en espéranto. Subitement, un des gardiens nous demande en espéranto :

- Êtes-vous espérantistes ?

- Oui !

- Bon ! Je vais faire tout mon possible pour vous aider à fuir car ce groupe va être fusillé.

Une heure après ce contact, je me sens tiré vers l'arrière. Il nous fait signe de nous jeter à terre et de ramper vers l'arrière. Ayant ainsi progressé jusqu'aux maisons toutes proches, nous remercions notre sauveur d'une rapide poignée de main et partons rapidement à travers la campagne. J'ai su plus tard que 141 civils avaient été fusillés.

Source : *Esperanto-info* N° 87 – janvier-février 2011

SAVIĜO PER ESPERANTO

La 21-an de majo 1940, en urbo Aubigny-en-Artois, la soldatoj de la invada armeo arestis multajn civilulojn. Mi mem estis unu el la arestitoj : ni devis stari apud muro, la brakojn supren. Apud mi Belgo. La Belgo estis Esperantisto kaj mi jam lernis iomete. Ni do interŝanĝis kelkajn esperantajn vortojn. Subite, germana gardstaranto demandis nin Esperante :

- Ĉu vi estas Esperantistoj ?

- Jes !

- Bone ! Mi klopodos helpi vin forkuri, ĉar la grupo ĉi tie estas elektita por esti pafmortigita.

Proksimume unu horon post tiu interparolo, mi sentis min tirata malantaŭen. Li faris signon, ke ni faligu nin kaj rampu malantaŭen. Rampinte ĝis malantaŭ la proksimaj domoj, ni dankis nian savanton per rapida manpremo kaj forkuris tra la kamparo.

Poste mi eksciis, ke 141 civiluloj estis pafmortigitaj tiun tagon.

Fonto : *Esperanto-info* N° 87 – januaro-februaro 2011

Revuoj por esti pli bone kunligitaj al la Esperantista movado



Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Esperanto-France.



Revue bimestrielle d'information en français sur la langue internationale et l'apprentissage de cette langue. Robert LLORENS a créé cette revue pour faire connaître l'espéranto et les activités des espérantistes, sans discrimination. Il avait terminé son premier éditorial par ces mots : «... Par ce modeste bulletin notre but est de montrer le besoin d'une langue commune neutre pour protéger la langue nationale et la culture de chacun...».



La Ondo de Esperanto estas esperantlingva gazeto eldonata en Rusio. Fine de ĉiu jaro la gazeto proklamas la Esperantiston de la Jaro. La gazeto aranĝas ĉiujare ankaŭ literaturan konkurson Liro kaj ekde 1998 Internacian Fotokonkurson. La redaktoro de la gazeto estas Aleksandr Korjenkov, kaj eldonanto kaj administranto Halina Gorecka. Eldonkvanto de La Ondo de Esperanto estas 700 ekzempleroj.



ESPERANTO REVUO, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko), aperas en ĉiu monato krom aŭgusto. Legata en 120 landoj, voĉlegata por vidhandikapitoj



LA SAGO, gazeto eldonita far SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kiu estas la plej grava tutmonda organizaĵo de laboristaj Esperantistoj kaj, kun ĉirkaŭ 600 membroj (2008), la dua plej granda tutmonda asocio, kies Esperanto estas la laborlingvo. Ĝi estas asocio, kiu celas faciligi la translingvajn kaj transcaciajn rilatojn inter tiuj homoj, kiuj luktas por mondo sen klasa nek alitipa ekspluatado.



MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 15an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto. 100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj. Legantoj en 65 landoj. Aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj).



KONTAKTO estas 16-paĝa, altkvalita, bele ilustrita, interesa kaj junuleca revuo, kiun legas homoj en pli ol 90 landoj tra la mondo. Vi trovos artikolojn pri specialaj kaj gravaj temoj, aktualaĵojn, novelojn, fabelojn, enigmojn kaj multon alian. La enhavo estas tre diversa kaj ĉiam varia. Por serioza diskuto, por distro, por kursoj. En KONTAKTO enestas ĉio. KONTAKTO aperas sesfoje jare, kaj al ĝi kontribuas gejunuloj el la tuta mondo. KONTAKTO estas la revuo de TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

Por pli da informoj kaj ekaboni :

Kontakto : <http://kontakto.tejo.org>

Monato : <http://esperanto.be/monato>

La Sago : <http://www.esperanto-sat.info>

Revue Esperanto : <http://www.uea.org/revuo>

Esperanto-info : <http://www.esperantoinfo.info>

La Ondo : <http://www.esperanto.org/Ondo>

Le Monde de l'espéranto :

<http://esperanto-france.org/abonnements-aux-revues>

Por pruntepreni tiujn revuojn :

Kontaktu nin (adreso sur la lasta paĝo) !

Multe pli da revuoj kaj gazetoj eldonataj en la mondo :

<http://www.gazetejo.org/gazetoj>

André Frangeul, rimarkinda figuro de la anĝeva Esperantista grupo



André dum la Zamenhof-Tago, decembro 2004, cenjariĝo de Esperanto en Angers.

André au cours de la Journée "Zamenhof", décembre 2004, année du centenaire de l'espéranto à Angers.

UNE BIOGRAPHIE BIEN REMPLIE...

Entre en apprentissage de typographe à 14 ans (en 1934).

Correcteur de presse au "Courier de l'Ouest" pendant 34 ans (1947-1981).

En 1945, crée, avec le concours des organisations syndicales, la délégation régionale de la toute nouvelle association de tourisme populaire "Tourisme et travail".

En 1944, s'intéresse à la langue internationale espéranto et participe à la renaissance d'un groupe espérantiste à Angers et n'a jamais cessé de travailler activement à la diffusion de cette langue par des cours, des expositions, des rencontres, l'accueil d'amis étrangers. Il a pris part à trois congrès mondiaux d'espéranto.

Secrétaire de la section syndicale des retraités de l'imprimerie angevine pendant une quinzaine d'années, il resta fidèle à son syndicat depuis 1937 et gardait un vif souvenir des mouvements sociaux de 1936.

En 1984, il fut l'initiateur d'une vaste exposition sur l'imprimerie depuis Gutenberg, à l'occasion du 150ème anniversaire de l'activité mutualiste et syndicale des travailleurs du Livre angevins. Mentionnons aussi qu'il fut bibliothécaire, pendant nombreuses années, de la Société Philatélique de l'Anjou.

Il aimait la musique et fut, comme son épouse, amateur d'opéra et membre fidèle des Amis de l'Art Lyrique.



*En restoracio kun Pierre, dum vizito de Havajano en Angers (2008).
Au restaurant avec Pierre, à l'occasion de la visite d'un Hawaïen (2008).*

*Asocia Forumo en Angers (2002)
Forum des Associations à Angers (2002)*



PLENPLENA BIOGRAFIO...

Iĝis tipografa metilernanto 14-jaraĝe (en 1934).

Gazet-korektisto ĉe ĵurnalo "Courier de l'Ouest" dum 34 jaroj (1947-1981).

En 1945, kreis, kun helpo de sindikataj organizaĵoj, la regionan delegacion de la tute nova popolturisma asocio "Turismo kaj Laboro".

En 1944, interesiĝis pri la internacia lingvo Esperanto kaj partoprenis en la renaskiĝo de Esperantista grupo en Angers, kaj neniam ĉesis aktive labori por la diskonigo de tiu lingvo per kursoj, ekspozicioj, renkontiĝoj, akceptado de eksterlandaj amikoj. Li partoprenis en tri Universalaj Kongresoj.



*UFE-kongreso en Angers, en 1950. Maldekstre dekstren : prof. Ivo Lapenna, M. Guillaume (UFE-sekretario) kaj André.
Congrès de UFE / Espéranto-France à Angers, en 1950. De gauche à droite : prof. Ivo Lapenna, M. Guillaume (secrétaire d'UFE) et André.*

KELKAJ ANEKDOTOJ...

- André tre frue eklaboris kaj akompanis al lernejo la junan filinon de la estro... tiu filino poste iĝis lia edzino !

- Ĉe librobokantisto en Angers, li hazarde trovis poŝtkarton kun subskribo de Zamenhof. Tion li ne menciis al la butikisto, por ke ne kresku la prezo. Oni eĉ diras, ke li grumbliis ĉar iu skribis sur la poŝtkarto... !

- Tuj post fino de la dua mondmilito, el la ĝardeno de amiko de Esperanto, librokesto estis elterigita, kiam la Germanoj apenaŭ foriris de Angers.

- Multmultfoje li, fervora pacifisto, plezurege rakontis ke post la 2-a mondmilito, la Esperanto-grupo estis la unua grupo, kiu akceptis Germanojn en Angers.

- Ĝis vivfino, li multfoje koleris kontraŭ la ĵurnalistoj, kiuj ne publikigis liajn informojn aŭ, plej malbone, ilin publikigis tranĉante aŭ tordante ilin.

QUELQUES ANECDOTES...

- André a commencé à travailler très tôt et accompagnait la jeune fille du patron à l'école... laquelle fille devint son épouse !

- Chez un bouquiniste d'Angers, il a par hasard trouvé une carte postale avec la signature de Zamenhof. Il n'a rien dit au bouquiniste, pour ne pas faire augmenter le prix. On dit même qu'il a rouspété parce que quelqu'un avait écrit dessus... !

- Dès la fin de la guerre, une caisse de livres d'espéranto fut déterrée du jardin d'un sympathisant, les Allemands étant à peine partis d'Angers.

- Combien de fois, pacifiste convaincu, il aimait à raconter que le groupe d'espéranto fut le premier, après la 2ème guerre mondiale, à accueillir des Allemands à Angers.

- Jusqu'au bout, il pesta contre les journalistes qui ne passaient pas ses communiqués ou, pire, les passaient en les tronquant ou les déformant.

Sekretario de la sindikata sekcio de la anĵuaj presistaj emeritoj dum ĉirkaŭ dek kvin jaroj, li daŭre fidelos al sia sindikato ekde 1937 kaj forte memoris pri la sociaj manifestacioj de 1936.

En 1984, li iniciatis vastan ekspozicion pri presarto ekde Gutenberg, okaze de la 150-a datreveno de la mutualaj kaj sindikataj aktivaĵoj de la anĵuaj Libro-laboristoj.

Oni menciis ankaŭ, ke li estis bibliotekisto, dum multaj jaroj, de la Filatela Societo de Anĵuo.

Li amis muzikon kaj estis, same kiel lia edzino, oper-spektanto kaj fidela membro de la Amikaro de Lirika Arto.

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org

www.uea.org
www.esperanto.net

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers - Tél. 02 41 73 17 97
Courriel : info@esperanto-angers.fr